# Dansk ESPERANTO-BLAD

UDGIVET AF
ESPERANTIST-
FORENINGEN
FOR
DANMARK

★

ELDONATA DE
CENTRA DANA
ESPERANTISTA
LIGO

★

30. ÅRG.
MARTS 1958
NUMMER

3



Kopenhago estos urbo de la 50-jara jubilea jarkunveno de CDEL, kiu okazos dum la pentekosto. Pri la unuaj detaloj legu en ĉi tiu numero!

**DANSK ESPERANTO-BLAD**
udkommer den 15. i hver måned.

Stof må være redaktøren i hænde senest den 25. i den foregående måned.

Redaktør: *Ole Nederland*, Primulavej 61, III, Odense.

Ekspedition: *Arne Kolle*, Landlystvej 48, Silkeborg.

Abonnement: 8 kr. pr. år.
Eksterlanda jarabono: 6 d. kr. aŭ 10 respondkuponoj.

## *Subtenantoj 1958 de CDEL*

| | |
|---|---|
| Stato la 25-an de januaro 1958 .... | 140,00 |
| S-ro H. Arne Pedersen, Horsens .. | 15,00 |
| S-ino Edith Schäfer, Arden ...... | 15,00 |
| S-ro N. C. Madsen, Brabrand ...... | 15,00 |
| S-ro A. H. Løgstrup, Frederikssund | 15,00 |
| S-ro O. Christensen, Fakse Ladepl. | 15,00 |
| S-ro Vagn Dybkær, Vejstrup ...... | 15,00 |
| S-ro Axel Sørensen, Aarhus ....... | 15,00 |
| S-ino Gerda Frellesvig, Kopenhago | 15,00 |
| F-ino Gudrun Riisberg, Kopenhago | 15,00 |
| F-ino Gudrun R. Jensen, Sall .... | 15,00 |
| S-ino Grete Simoni, Kopenhago .. | 15,00 |
| S-ro O. C. Lange, Kopenhago .... | 15,00 |
| F-ino Rigmor Pedersen, Silkeborg .. | 15,00 |
| S-ino Agnes Bøgh-Høgsted, Aarhus | 15,00 |
| S-ro Henry Frank Nielsen, Roskilde | 15,00 |
| S-ro H. Hammer, Aarhus ........ | 15,00 |
| S-ro Bent Sejr Trier, Haslev ...... | 30,00 |
| S-ro H. E. Jensen, Toustrup ...... | 15,00 |
| S-ro Chr. Kelvang, Kolding ...... | 15,00 |
| F-ino A. S. Weismann, Kopenhago | 15,00 |
| F-ino Anna Petersen, Kopenhago .. | 15,00 |
| S-ro Aug. Lassen, Kopenhago .... | 15,00 |
| S-ro C. Graversen, Esbjerg ....... | 15,00 |
| S-ro Edvin Jensen, Aabenraa ...... | 15,00 |
| S-ro Lauritz Larsen, Odense ...... | 15,00 |
| Stato la 25-an de februaro 1958 .... | 530,00 |

La ĉefestraro de CDEL ege esperas, ke ĉiu membro de CDEL estu Subtenanto, — kaj vi estas Subtenanto, se vi enpagis min. 15 kr. al poŝtkonto 57370:

Centra Dana Esperantista Ligo,
*L. E. Kromann Jensen*,
Algade 11, Nykøbing Sjælland.

## D. E. F. meddeler:

HARZEN, påsketur, 3.—7. 4. 1958, 5 dage, 216 kr. Bus. Start fra Aarhus 3/4 kl. 7. Ankomst om aftenen til Bad Harzburg, hotel Deutsches Haus. Udflugter: svævebane Burgberg, Goslar, vandfald Radau og Romker, Bad Grund osv.

ØSTRIG, 29/6—8/7, 10 dage. 475 kr. Jernbane fra Kbh. og Aarhus. Liggevogn fra Hamburg, næste morgen ankomst Salzburg og Werfen. Hotel Post, 7 dage med udflugter til saltminer Hallein, lystslot Hellbrunn, isgrotte osv.

ØSTRIG — ITALIEN — JUGOSLAVIEN, 6.—17. 7, 12 dage. 727 kr. Jernbane til Salzburg, herfra bus over Grossglockner til Triest (3 dage), Venezia (3 dage), Postojna grotter og Ljubljana i Jugoslavien (2 dg.), over Tauern-bjerge til Salzburg og med toget hjem.

HELSINGØR, Internationale feriekursus på Den internationale Højskole, 19.—26. 7., 7 dage. Kursus for begyndere, viderekomne, vordende Cseh-lærere osv. Pris 135 kr.

HARZEN, 27/7—31/7. 5 dage, 179 kr. Bus Samme tur som ovenstående påsketur, blot skal vi bo på større rum i Goslar. Alt andet er ellers ens.

KONGRESTUR TIL MAINZ, 10 dage, 1.—10. 8. 465 kr. Bus. Overnatte i Hannover, næste eftermiddag ankomst til Mainz, deltage i kongres. Udflugter til Bingen, Rüdesheim, heldagstur på Rhinbåd til St. Goar osv. Hjemtur over Köln.

VEJLE. E-feriekursus på Idrætsskolen, 19.—26/10. Begyndere og viderekomne.

Udførligt program for hvert arrangement fås hos

*L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj.*

# Kopenhago jarkongresurbo 1958

Kaŭze de la okazigo de 50-jara jubileo kaj jarkongreso de Centra Dana Esperantista Ligo en Kopenhago la 24—26-an de majo (pentekoste) certe estas konvene prezenti al la espereble multaj partoprenantoj iom pri Kopenhago.

La urbo estas priparolita la unuan fojon en la jaro 1043 je la nomo Hafnia kiel la plej granda komercurbo en la Nordo. Por protekti ĝin episkopo Absalon en la jaro 1167 konstruis ŝtonkastelon sur unu el la insuletoj inter Amager kaj Selando. Sub la ŝirmado de tiu kastelo la urbo ege floris. La urba blazono kun la tri turoj certe montras la aspekton de la kastelo. Ĝia ringmuro farita el blankaj kretŝtonoj de la deklivo de Stevns estas dekovrita sub la nuna Christiansborg.

La urbo, kiu vastiĝis ĉirkaŭ la kastelo, havis la saman sorton kiel la kastelo kaj estis post la morto de Absalon en 1201 alterne posedaĵo de la episkopoj de Roskilde kaj la reĝoj. En 1368 la Hansanoj detruis la urbon kaj la kastelon, sed episkopo Peder Jensen Lodehat kaj Erik el Pomrujo rekonstruis ilin en la jaroj 1412—1439, ili de tiu tempo restis kiel posedaĵo de la reĝoj.

La unua reĝo, kiu vere sentis sin ligita al Kopenhago, estis Kristiano la IV, kaj lia persona iniciativo forte stampis la urbon. Li konstruis la kastelon Rosenborg, la Borson, La Rondan Turon, la studentan kolegion Regensen, la Reĝan ĝardenon, Nyboder kaj Kristianshavn.

Escepte de la diritaj domoj, la urbo konsistis el malgrandaj domoj el ligno kaj trabaĵo, kiuj facile fariĝis viktimoj de la du grandaj fajroj, kiuj en la jaroj 1728, kiam la 2/5 de la urbo (1670 domoj) bruliĝis, kaj en 1795, kiam 951 domoj cindriĝis, kaj krome en 1807 — dum la bombardo de la angloj — grandaj partoj detruiĝis, kaj tial ĝi ne havas malnovan stampon.

La plej aĝaj konstruaĵoj, kiuj ankoraŭ konserviĝis, devenas de la tempo de Kristiano la IV, pli aĝaj estas nur la ruinoj sub la kastelo Christiansborg, la ruino de la Turo de Jarmer, la malgranda restaĵo de katolika episkopa domo, kiu troviĝas en la korto de la Universitato kaj la enteriga kapelo de la Preĝejo de l' Sankta Spirito.

Ni devas rapide trans multajn eventojn, kiuj dum la venontaj jarcentoj donis al la urbo sian stampon. Ĝi estas centro de komerco, industrio kaj ŝiptrafiko, urbo kiu laboras, sed ankaŭ en neordinara grado urbo, kiu komprenas utiligi sian laboran tempon. Grandaj parkoj kaj arbaroj estas la pulmoj de la urbo, sed antaŭ ĉio vi estos impresata de la bonkora gaja tono, kiu estas karakteriza trajto de Kopenhago. Sur tiu fono, vi ekkonu kaj sentu Kopenhagon. BONVENON AL KOPENHAGO!

*

## Provizora programo

*Sabaton la 24-an de majo:*
Interkona vespero.

*Dimanĉon la 25-an de majo:*
Malfermo de la jarkongreso.
Fotografado.
Ĝeneralkunveno.
Lunĉo.
Ĝeneralkunveno (daŭrigo).
Laborkunveno.
Festmanĝo.
Festvespero.

*Lundon la 26-an de majo:*
Fakkunvenoj.

## Ministro kiel protektoro

Ministro por enlandaj aferoj *Søren Olesen* promesis esti protektoro de la jarkunveno.

La postenoj de la kunvenkomitato: Prezidanto: *Aksel Nielsen*, sekretario: *Ole E. Schrøder*, kasistino: *Ileana M. Schrøder*, loĝiga servo: *Ejnar Hansen*; plie funkcias ekster la komitato pri la gazetara servo: *O. C. Lange*, kiel festkomitato: *Kaj Rosenberg* kaj *Kaj Gabriel-Hansen*, kiel konsilanto: *Sv. Dragsted*.

Jarkunvenejo: Selskabslokalerne, Jernbaneallé 41, Vanløse.

*

ĈIUJ PREZOJ PRI LA JARKUNVENO estas menciitaj sur la malantaŭa flanko de la ĝirkarto, kiu troviĝas en la marta n-ro de DEB. — Ĝiro-n-ro: 978.20. — Adreso de la komitato: Esperanto-årsmødet, Kbh. K.

---

## Ĝeneralkunveno de EADI

Esperanto-Asocio de Danaj Instruistoj okazigos sian ĝeneralkunvenon en rilato al la jarkunveno, lundon la 26/5.

Oni atentigas, ke proponoj por la tagordo devos esti en la manoj de la prezidanto minimume 14 tagojn antaŭe. Krome ke ĉiuj membroj rajtas skribe transdoni sian voĉdonrajton al alia persono kiu ĉeestos la kunvenon.

*Ole Nederland,*
prezidanto.

---

## Sveda jarkongreso en Göteborg dum pasko

La ĉijara kongreso de Sveda Esperanto-Federacio okazos 5—7 de aprilo (do dum la paskaj tagoj) en Göteborg, kien invitas Esperanto-Societo de Gotenburgo. Estas konata fakto, ke Göteborg havas unikan pozicion en la centro de Skandinavio — en same malmultaj horoj vi povas atingi la urbon de Kopenhago, de Oslo, de Stokholmo. En tiu urbo ankaŭ kolektiĝis la anaro de unua skandinava Esperanto-kongreso en 1918. Nun la organizantoj havas la esperon, ke la ĉijaran kongreson partoprenos kiel eble plej multaj gastoj el Norvegujo kaj Danujo. Nesvedoj ne pagas kongreskotizon sed nur la rektajn kostojn por la aranĝoj. Norvegoj kaj danoj kutime sin sentas hejmece en nia urbo, kaj ni promesas fari nian plejeblon por la bonfarto de la gastoj. La ĉefa celo de la kongreso kompreneble estas la jarkunveno de SEF, sed ni aranĝas multon ekster ĝia kadro: distra vespero, prelego de Marjorie Boulton, unika ekskurso per boato al la fortikaĵo Alvsborg kun esperanta diservo en la kapelo de la fortikaĵo, vizito en Esperantoplatsen k. t. p. Certe blovos freŝaj ventoj dum la kongreso, kaj vin atendos agrabla kunestado kaj vigla diskutado kun samideanoj. Kongresejo estas Göteborgs Kontoristförening, Store Nygatan 23—25, kie ni kaj kunvenos kaj manĝos (kaj eventuale dormos). Skribu al ni por ekhavi la detalan programon kaj indikojn de la kostoj. Adreso nur: Esperantokongressen 1958, Göteborg N, Sverige. Bonvenon!

*Loka Jarkongresa Komitato.*

---

## Nova eldono de »Verden bliver mindre og mindre« nun estas preta

Dank' al la multaj Subtenantoj-kotizoj de la membraro de CDEL estis denove eble eldoni la broŝuron „Verden bliver . . "

Ĝi nun aperis en formo de kajereto (13 × 17 cm), presita en du koloroj sur pli bona papero.

Konsidere ke la broŝuro estas nepre bezonata en la propaganda laboro, la vendprezo nur estas

*1 kr. por 10 ekzpl. + afranko.*

Ricevebla de la afergvidanto de CDEL,
*L. E. Kromann Jensen,*
Algade 11, Nykøbing Sjælland.

---

ĈIUJ DANAJ PARLAMENTANOJ ĵus ricevis de CDEL ekzempleron de la nova eldono de „Verden bliver mindre og mindre".

# *43-a Universala Kongreso de Esperanto*

**Mainz 2.—9. aŭgusto 1958 Germanujo**

Tilmeldelsesblanketter fås hos kongressens repræsentant: *C. D. E. L.s Kongresrejse-afdeling, Prins Jørgensgade 4 A, København N., giro 70617.*

Tilmeldelsesgebyr:: (Den første pris gælder indtil 31/3, den anden fra 1/4.)

| | | |
|---|---|---|
| *Kongresdeltager* ........ | *kr. 54* | *kr. 60* |
| *Kongresd.s hustru/mand* | *kr. 27* | *kr. 30* |
| *Unge (ikke over 20) og studenter* ............. | *kr. 19* | *kr. 20,50* |

Medlemmer af UEA erholder rabat, kongresdeltager: kr. 8,00, hustru/mand: kr. 4,00. Tilmeldelsesblanket og gebyr sendes til ovenstående adresse.

*

## OFICIALA KOMUNIKO

*Inaŭgurejo:* La nun konstruata Sporta Palaco de la Universitato, la plej granda kaj moderna konstruaĵo de Mainz, estos la Inaŭgurejo de la 43-a Universala Kongreso de Esperanto.

*Filmo:* La mondkonata Firmo Gevaert decidis eldoni sian kolorfilmon en Esperanto. La filmo estos unuafoje montrata okaze de la 43-a Universala Kongreso de Esperanto.

*Teatra Vespero:* La Internacia Arta Teatro, formita grandparte de jugoslavaj aktoroj, sub la reĝisorado de s-ro *S. Flego* el Parizo, ludos en Esperanto dum la Universala Kongreso la ĉefverkon de la norvega verkisto Ibsen, „Fantomoj".

*Oratora Konkurso:* Por gejunuloj ĝis 25 jaroj okazos Oratora Konkurso pri „Juna kaj pliaĝa generacioj". La premioj disponigitaj de L. K. K. kaj de UEA konsistas el: 1. stipendio de 70 markoj por partopreni en internacia esperantista aranĝo. 2. Esperanto-libroj ĝis 50 markoj. 3. Esperanto-libroj ĝis 30 markoj. La juĝkomisiono konsistas el: s-ro *H. Bourdelon,* veterano, s-ro *W. Auld,* verkisto, s-ro *G. Becker,* prezidanto de T. E. J. O. La regularo de la konkurso estas publikigita en la Dua Oficiala Bulteno.

*Kongresaj Sekcioj:* La Estraro de UEA decidis, ke la Kongreso laboru en du sekcioj. La unua pritraktos: „Reciproka aprezado de okcidenta kaj orienta kulturaj valoroj. La rolo de la Internacia Lingvo" (Prezidanto: Prof. *Yagi,* Japanujo; Ĉefraportanto: Prof. *Lapenna,* Britujo). La Dua pritraktos: „La lokaj societoj — kerno de nia Movado" (Prezidanto: D-ro *Hermann,* Germanujo; Raportanto: s-ro *Strönne,* Svedujo).

*Bankedo:* Por festi la oran Jubileon de UEA okazos dum la Kongreso komuna bankedo. Kotizo: 10 germ. markoj.

*Statistiko:* Entute 976 el 29 landoj. (Pasintjare: 645 el 27 landoj).

G. C. *Fighiera.*

---

# *La fulmtrajno*

PEDAGOGIA SEMAJNO estos aranĝata de la iniciatinto de la internacia lerneja entrepreno Grajnoj en Vento, *Marcel Erbetta,* Rue des Pins 66, Bienne-Biel, Svisujo. La semajno estos de 21/7 ĝis 31/7 kaj okazos en Broc, Gruyere-Greyerzlando, belega montara regiono, por geinstruistoj kaj iliaj infanoj. Detaloj kontraŭ 1 resp. kup. de s-ro Erbetta.

STUD. ESP., la internacia studenta revuo esperantista, eldonis sian 2-an n-ron,

kiu estiĝis en kunlaboro inter danaj, anglaj, germanaj kaj jugoslavaj studentoj. La enhavo ampleksas i. a. tradukon de „Revido“ de *Goldschmidt*, de „Leteroj akcelantaj la humanecon“ de *J. G. Herder*, originala fabelo de *Kai Rosenberg* „La vulpo kaj la mondpaco“ kaj interesa artikolo pri „Vortsugestio kaj neologismoj“. — La revuon ekspedas *Jens Falkentorp*, Nørre Alle 75 (n-ro 471) Kbh. Ø.

JUNULARA SEKCIO de CDEL estas pripensata.

LA URBESTRO DE MAINZ, mem esperantisto, enparolis sonrubandon kun invito al la kongreso 1958. La rubando (por ordinara magnetofono, kun rapideco de 9,5 cm, kun daŭro de 2-3 minutojn) estas pruntebla ĉe CDEL de ĉiuj ties kluboj.

POR PRELEGOJ EN NEESPERANTISTAJ SOCIETOJ admonas cirkulero de CDEL de 20/2. La cirkulero konstatas, ke ofte mankas interesaj temoj por la kunvenoj de tiuj societoj.

PRINTEMPA ESPERANTISTA RESTADO EN HISPANUJO estos aranĝata por la periodo 1/6 — 14/6 en la urbo Perlora, Asturias. Pro subteno de hispanaj sindikatoj la kostoj estas nur 525 pesetoj. El la programo estas menciindaj diversaj folkloraj aranĝoj: tipaj dancoj, horkoncertoj ktp. Ĉiu partopr. anoncu sin kaj antaŭpagu antaŭ 1/5 al la Esp.-Klubo „*Nordo*“, Str. San Juan 10, Oviedo, Hisp.

ITALA TURISMA KLUBO eldonis prospekton en Esp. — Adreso: Milano C. o. Italia, 10, Italujo.

14-a INTERNACIA JUNULAR-KUNVENO de TEJO okazonta en Homburg (Sarlando) de 26/7 ĝis 2/8 fariĝis oficiala antaŭkongreso de UEA. — Ankaŭ plenkreskuloj povos partopreni, laŭ kondiĉoj haveblaj per la oficejo (14. Int. Junular-Kunv. de TEJO, Homburg/Saar, Germ.).

11-a KONGRESO DE KELI, Kristana Esp. Ligo Internacia, okazos en Würzburg, Germanujo de 26/7 ĝis 2/8. Ĉeftemo estos „KELI kaj la eklezioj“. Krome oni povos partopreni studojn, diskutojn, distrajn kunvenojn, ekskursojn, filmprezentadojn ktp. — Tuta prezo: 75 D. M. Informojn donas *R. Hoppe*, 13-a Auerbach über Ansbach (Mittelfr.) Germ.

# AL AMIKINO

de E. Aarestrup.

*Sur via lipo sorĉo ludas,*
*abismo loĝas en l' okul',*
*en via voĉ' sublime sonas*
*etermuzika sonĝolul'.*

*Klarbrile lumas via frunto,*
*mallumas nigre la harar',*
*kaj florospira bonodoro*
*ĉirkaŭas vin ĉe ĉiu far'.*

*Trezoron de eterna saĝo*
*malkaŝas via vang-kavet',*
*el via menso vive fontas*
*por ĉiuj koroj nova kred'.*

*Vi estas tuta universo,*
*kaos̆e reva vivaŭror'.*
*— Neniam ĉesos mi vin laŭri*
*kun piaj amo kaj ador'.*

(trad. C. *Graversen*)

EL POPOLA ĈINIO. — Rilate la reaperon de tiu tre interesa, kultura revuo oni informas al ni, ke oficiala dana peranto estas Eldonejo *Koko*, Randbølvej 4, Kbh. F., ĝiro 96.289. — Abonprezo de unu jaro (6 n-roj) estas nur 5 kr.

ESPERANTISTA KORESPONDA CENTRO enregistrigas senpage la adresojn kaj korespond-dezirojn de ĉiuj korespondemaj samideanoj. Skribu por partopreni tiun servon al la gvidanto *R. Melo*, 6, Place Jules Ferry en Saint Etienne, (Loire), Francujo. Vi ricevos senp. regularon kaj ricevateston.

KULTURARANĜOJ 1958 EN GRESILLON: 30/3—13/4: Esp.-kurso, bindarto,

korbfarado, ludoj, dancoj k. a. — 15/6—14/7: Ripozo, Esp.-kurso por komencantoj, bindarto k. a. — 15/7—27/7: Internaciaj ferioj. — 27/7—10/8: Lernado de la franca lingvo dank' al Esp. — 10/8—31/8: Esperantistaj Kulturaj Semajnoj. — 1/9—20/9: Ripozo kaj diversaj aranĝoj. — En „Internaciaj Ferioj" partoprenos kiel prelegantoj Paul Neergaard, A. Albault, R. Watier kaj P. Babin. — Pliajn informojn donas Esp. Kulturdomo, Kastelo „Gresillon", Baugé (maine et Loire), Francujo. Resp.kup. petata.

33-a BULGARA E.-KONGRESO okazos en Varna dum la unua duono de julio. Por grandskala ekspozicio oni petas afable infandesegnaĵojn, fotojn, poŝtm., Esp.ajn aŭ danajn presaĵojn. Adreso: *Zora Mladenova Ĥans,* Ljuben Karavelov 79, Varna, Bulgarujo.

RADIO ROMA elsendas en Esp. per 30,90 m, 41,24 m kaj 50,34 m. Programo 15/3—31/3:
18.: Festivalo de la itala kanzono. — 19.: Kuriero de Esp. — 21.: La itala urbo Cassino. — 25.: Novaĵoj el Italujo. — 26.: Kuriero de Esp. — 28.: Palmodimanĉo. — Post aŭskultado sendu karton al la sendstacio!

INTERNACIA JUNULARKONGRESO BERLIN invitas vin por la pentekosto 1958 (23/5—30/5) en la kadro de la 5-a Interzono Renkontiĝo. Loko: Moderna lernejo. - Programo: Interkona vespero, akcepto ĉe la urbestro, socialista matenfesto, diservoj, teatrovizito, busveturado tra Berlino, sportaj kaj kulturaj vesperoj k. a. Kotizo (por ĉiu): 32 gm. okc. Kiuj havas financajn malhelpojn skribu al la komitato. Kromajn informojn: EJB-oficejo, Berlin-Neukölln, Richardstr. 61 Lr. — Aliĝfino: 30/4.

ĈEĤOSLOVAKIO eldonis turisman faldprospekton en Esperanto, akireblan ĉe Ĉeĥoslovaka Turisma Servo, Praha 3, Na Prikope 18.

43-a UK EN TELEVIDO estas provizore nerealaĵo, ĉar la radiaj kaj televidaj instancoj en Germanujo estas malfavoraj. Sed la germanaj esp.istoj preparas sisteman bombardadon per instigaj leteroj. Por ke tia bombardado povu okazi en unu tago, oni serĉas kunlaborantajn kontaktulojn ankaŭ en Danujo. Skribu al s-ro *Heinrich Wielgus,* Elise-Averdieck-Str. 34 I., Hamburg 26, Germanujo.

VEGETARANO estas organo de Tutmonda Vegetara Asocio. La vintra numero i. a. enhavas interesan artikolon pri establiĝo de Internacia Vegetara Kolonio, kaj atentindan legaĵon „Pri la morala venko de la homaro". Dana peranto de la gazeto: *Betty Larsen,* Gl. Strandvej 288, Humlebæk. Abonprezo: 4 respondkuponojn aŭ egalvaloron.

## Internaciaj feriaj kursoj

En Helsingør okazos en la semajno 19.—26. 7. — La kursejo kiel kutime estas la ĉarma Internacia Altlernejo, kaj la prospekto nun presita promesas varian programon. La kursoj ampleksas: *Daŭrigan kurson* kun s-ino *K. Zacho, Konversacian kurson* kun f-ino *Ida Christensen, Rapidkurson* laŭ la Cseh-metodo kun s-ro *Morariu,* kiu ankaŭ estos gvidanto de la *prepara kurso por Cseh-metodaj geinstruistoj.* Krome estos evt. aranĝata *infankurso.* —

La ekskursoj iros al Kronborg, Hillerød kaj Hälsingborg. Vespere estos prelegoj, filmprezentado, gajaj programoj aŭ la tradicia internacia balo. Prezoj de la restado: 135—175 kr. — La prospekto estas havebla ĉe la aranĝanto s-ro *L. Friis,* Ingemannsvej 9, Aabyhøj.

## Deziras korespondi

Pri vojaĝoj, migrado, poŝtm. kaj glumarkoj: 27-jara Ladislao Kapuŝi, Miŝkolc, Arok, U. 25, Hungarujo.

Kun interŝ. de poŝtm., bildgazetoj, libroj ktp.: 44-jara laboristo P. M. Penevski, kv. Cernokonevo, Dimitrovgrad, Bulgarujo.

18-jara japana komerca studento Gotoo Takaŝi, 1291 Bunkamaĉi Kadota, Okajama urbo, Japanujo.

# *Novaj libroj*

*

## La Jubilea Libro de KEK

Pri ĝi skribis la prezidanto de la Sveda Esperanto-Movado, s-ro *Jan Strönne*, Malmö:

Ĝi estas vere bonege farita, kaj dank' al ĝia ekzistado via jubileo estos pli inda ol tiu de multaj aliaj altrangaj kluboj. Ŝajnas al mi, ke vi kunprenis ĉiujn gravajn detalojn de la historio, kaj la libro sendube estas kaj estos grava trezoro ĉe ĉiu KEK-ano, nova aŭ malnova.

Se vi ankoraŭ ne aĉetis ĝin, tuj tion faru sendu ekzempleron al viaj amikoj.

Ĝi estas havebla ĉe la klubaj kunvenoj, prezo kr. 5,00. Restas ankoraŭ kelkaj numerigitaj ekzempleroj, aĉetante ilin vi subtenas la aperon de la libro. Rezervu unu el ili por vi mem.

*K. E. K.*

*

*Georgo Deŝkin:*

### Elektitaj versaĵoj 1909—1956.

Nova Libro n-ro 7. Eld. Serbia Esp.-Ligo, Terazije 42, Beograd, Jugosl. 1957. 54 paĝoj.

Dolĉe malgajaj poemoj, metrike klaraj, regulecaj en tradicia stilo, plaĉaj kaj facile percepteblaj. Rimarkinde estas, ke du el la poemoj estas premiitaj jam en 1913 kaj montras stilon por tiu tempo eksterordinare matura. — Kantoj pri amo, la naturo, al personoj — kaj pri Esperanto. Valora eldonaĵo.

*

*J. D. Applebaum:*

### Jozefo.

Drama poemo en kvar aktoj kaj epilogo, bazita sur la biblia rakonto. — Prezento de Reto Rossetti. — La Laguna, J. Régulo,

(Daŭrigo p. 42)


## UNUECO ESTAS FORTO

**FARIĜU INDIVIDUA MEMBRO DE U. E. A.**

La kotizoj estas jenaj:

Kategorio M J (Membro kun jarlibro) ......... kr. 12,50
Kategorio M A (Membro-abonanto, kiel M J + abono de „Esperanto“) kr. 25,00
Kategorio M S (Membro-subtenanto, kiel M A) . kr. 37,50
Kategorio S A (Simpla abonanto de „Esperanto“) ................ kr. 18,00

La pagon vi povas sendi al

*Søren Andresen,*
ĉefdelegito de UEA,
Friggsvej 10, Fredericia.
Poŝtĝiro 12692.

**AGRABLAN SUPRIZON**

*vi havos kvin fojojn dum la jaro se vi abonas la revuon*

# *Norda Prismo*

*la socia, kultura kaj literatura revuo. Redaktoro: F. Szilàgyi. Redakcia komitato: B. Ragnarsson, Islando. H. Rosbach, Norvegujo. V. Setälä, Finnlando. P. Thorsen, Danlando.*

*Abonprezo: 10,00 sv. kr. Abonu per nia poŝtĉeka konto: 15 54 80, aŭ ĉe via landa libroservo. Specimenon kontraŭ 2 respondkuponoj.*

*Norda Prismo,*
*Barnhusgatan 8,*
*Stokholmo.*

**Eventuala profito de la Kongresvojaĝa Servo de CDEL eniras la kason de Centra. Tial utiligu tiun vojaĝservon se vi iros al Mainz.**

# LA KLUBA VIVO

Redaktas: S-ino *I. Iburg*, Sct. Clemens, Fyn.

*Nyborg.*

Ordinara ĝeneralkunveno okazis la 31/1 kun multaj ĉeestantoj. Ĉiuj elektoj estis reelektoj. — Post la ĝeneralkunveno la prezidanto montris lumbildojn de sia vojaĝo tra Jugoslavio. *T. J.*

*Fredericia.*

La 22/1 okazis la ordinara ĝeneralkunveno. 18 membroj ĉeestis. — La prezidanto i. a. sciigis, ke la membronombro la 31/12 estis 92, tio estas pliiĝo de 7 kompare kun lastjare. Dum la jaro estis 17 klubaranĝoj. — La prezidanto estis reelektata per aklamacio. Novaj estraranoj fariĝis *Jenny Nielsen* kaj *Damgaard Larsen*.

El „Nia Ligilo".

*København.*

Til generalforsamlingen den 22/1 var der mødt ca. 40 medlemmer. — Den fungerende formand, *Aksel Nielsen*, aflagde beretning, og i sin egenskab også som kasserer fremlagde han derefter regnskabet. — Under det følgende punkt på dagsordenen erklærede *Aksel Nielsen* L. K. K. (Kongres-Komiteeen) for ophævet efter en tale af *Kühlmann* (komiteeens formand), som overgav en smuk og imponerende bog, hvori var samlet alt, som var trykt eller på anden måde forelå i anledning af kongressen, til klubbens bibliotek. Et andet eksemplar er overdraget til U. E. A. Det er den første verdenskongres, der har samlet og udgivet en sådan bog. — Bibliotekaren aflagde beretning om benyttelsen af biblioteket, og Kühlmann aflagde beretning om sin virksomhed som delegito for U. E. A. — Som ny formand (for eet år) valgtes Kühlmann, og til bestyrelsen nyvalgtes (for to år) *Ejnar Hansen, Anna Riis* og *Erik Brandstrup*. (El „Kontaktilo")

*Odense.*

S-ro *Fötinger* grandsukcese faris sian lumbildprelegon la 15/2. Poste oni trinkis kafon kaj dancis. 64 personoj ĉeestis.

La 26/2 ni havis novan „tavolkukan vesperon". *Hubert Krüger* el Berlino ludis kun ni, du knaboj prezentis skeĉon, kaj kromaj distraĵoj estis amuza konkurso pri la pezo de *J. Brodersen*, marioneta komedio kaj telepatia surprizo, 21 pers. ĉeestis.

## ***Kie mi trovos la klubon?***

(Bonvolu sendi vian klubprogramon por la periodo 15/4–15/5)

| KLUBO | KUNVENEJO | TAGO | HORO | TEMO |
|---|---|---|---|---|
| Fåborg | Rasm. Hotel | 22/3 | 20,00 | Aftenskoleafsl., Joŝiko Kaĵino |
| Fåborg | Korsal, Kap.str. | 23/3 | 20,00 | Hyggeaften med Joŝiko Kaĵino |
| Fåborg | „Risten" | 13/4 | 20,00 | Årsfest |
| Odense | Kragsbjerggd. | 26/3 | 20,00 | T. Miletie: Jugoslavio |
| Fredericia | ? | 26/3 | ? | Kursfina festo |
| København | ? | 29/3 | 19,30 | Joŝiko Kaĵino |

# La infanoj

*

## Kie loĝas s-ino Olsen?



„Kie loĝas s-ino Olsen?“ demandis Peter al sinjoro, kiun li *renkontis*.

Peter estis *komisia knabo* kaj devis porti kelkajn *varojn* al ŝi.

„Sinjorino Olsen“, respondis la sinjoro, „ŝi loĝas en unu el la tri domoj, kiujn vi vidas; sed mi estas *incitema*, kaj mi ne volas tuj diri, en kiu el ili ŝi loĝas. Iru al la unua *vojkruciĝo*, iru *dekstren*, *poste* maldekstren, poste maldekstren, *rekte*, dekstren, dekstren, rekte, dekstren, rekte, dekstren, dekstren, rekte, maldekstren kaj dekstren. *Tiam* vi venos al la domo de sinjorino Olsen.“

Peter *memoris* precize la vortojn de la sinjoro, kaj 10 minutojn poste li donis al s-ino Olsen la varojn.

Ĉu ŝi loĝis en la domo kun flagstango, en la domo kun *televida anteno* aŭ en la domo ĉe la arbo?

Renkonti = møde, komisia knabo = bydreng, varo = vare, incitema = drillesyg, vojkruciĝo = korsvej, dekstren = til højre, poste = derefter, rekte = ligeud, tiam = så, memori = huske, televida anteno = fjernsynsantenne.

*

SOLVO de *„La sep fratoj“*; Peter rigardas piedpilkan ludadon, Jens ludas ŝakon, Hans tamburas, Nikolai boksas, Ib rajdas, Jørgen trombonas, kaj Lars ludas manpilkon.

— *La erara afero* en la raporto pri Lis kaj Erna estis la informo, ke Esbjerg estas la plej okcidenta urbo de Danujo.

Inter tiuj kiuj eltrovos, *en kiu domo loĝas s-ino Olsen*, partoprenos en lotumado pri libropremio.

---

(Daŭrigo de p. 40)

Eldonisto, 1957. — 120 paĝoj; aŭtorportreto; kovrilo skizita de John Hartley. — 16 × 22,5 cm.; 210 gr. — Stafeto, Bel-literatura Eldon-serio, 10. — Prezo: ĉ. 7 kr.

Drama poemo — jes, pli da poemo ol da dramo! Ĉarma verkaĵo bonstila kaj facile legebla, sed kiel dramo ne altranga. Oni miras, ĉar la aŭtoro preteriris tiujn epizodojn de la konata historio, kiuj precipe taŭgus por drama prezentado: La „ludon“ inter Jozefo kaj la edzino de Potifera kaj, eĉ pli grave, la revidon inter li kaj liaj fratoj post tiom da jaroj! Mankas en la verko sanga varmo, moviĝemo, reliefiĝo. Tro da trankvila, filozofia interparolo. Sed oni legas ĝin kun vera simpatio al la aŭtoro.

*

## Bibliografio de Scienca Literaturo Esperanta en Japanujo

kaj

## Bibliografio de Medicina Literaturo Esperanta en Japanujo.

La 43-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj por 50-jara jubileo de la Japana Espmovado. 1956.

Du publikaĵoj, kiuj donas fortan impreson de la signifo de Esperanto! — Antaŭ kelka tempo mi ricevis leteron de amiko

# TURISMA OFICEJO

arrangerer følgende rejser i sommeren 1958:

*6.—21. juli (begge dage incl.):*

En 16-dages rejse til

## Rivieraen og Monaco

(Gennem *Holland, Belgien* og *Luxemburg,* og hjem gennem *Schweiz.)*

Vi bor på et 1. klasses hotel i

**Monte-Carlo** (4 dage)

*31. juli—11. august (begge dage incl.):*

En 12-dages rejse til

## Den romantiske Rhin: Verdenskongressen i Mainz

(Udflugt til *Heidelberg* og heldagssejltur på *Rhinen.*)

Begge rejserne foretages med ny, moderne turistbus.

Tilmeldelse og nærmere oplysninger:

**RIGMOR og S. K. NIELSEN**
**Havepladsvej 129, Fredericia. Telefon 1935**


pri Interlingue, kie li diras, ke Esperanto ja ne montris sin taŭga kiel ilo por la scienco. Nun mi sendos la du ampleksajn kajerojn al li!

*Joze Kozlevĉar:*

### Al la Venko.

Historiaj eventoj dum 35 jaroj de Espmovado en Ljubljana. Eld. Esperanta societo Ljubljana 1956. — 30-paĝa raporto montranta la viglecon de la jugoslava espmovado, speciale interesa kompreneble por tiuj, kiuj vizitis tiun ĉarman, grandiozan landon. — Kun fotoj.

*H. E. J.*

### Nova komunkomitato?

Laŭ deziro en ĉiuj danaj E.-asocioj pri organiza kunlaboro, la gvidantoj de DLEA, DEFA kaj CDEL antaŭ kelka tempo kunvenis por serĉi reciprokan kontakton. Oni faris kelkajn proponojn, kaj de ilia sorto ĉe la ĉijaraj kongresoj de la tri asocioj dependos la eventuala nova komitato.

### Nova afergvidanto de DEB

Kiel vi jam rimarkis, nia membrogazeto ricevis novan ekspediston. Jam ekde februaro funkcias s-ro Arne Kolle, Landlystvej 48, Silkeborg, kaj per ĉi tiuj linioj li ricevu koran bonvenigon kun la malafabla espero, ke lia laboro konstante kresku.

# HEROLDO
## DE ESPERANTO

*Duonmonata internacia organo de la Esperanto-movado*

**Prezoj en 1958**

| | |
|---|---|
| Abono tutjara .......... | kr. 22,00 |
| Abono julio-decembro .. | kr. 10,00 |
| Anonceto ĝis 25 vortoj .. | kr. 3,50 |
| Anonceto 26 ĝis 50 vortoj | kr. 7,00 |
| Anonco pokvadratcentimetre | 0,60 |

*Pri HEROLDO-libroj petu libro-liston*

**Dana peranto**

★ S-ino G. JAKOBSEN
Carit Etlarsvej 14,
Aabyhøj.
Poŝtkonto 54133.


## PAŜO POST PAŜO

Memorlibro de la Esp-societo en Bjeloyar, Jugoslavio. (Eld.). Prezo: 2 int. resp. kuponoj. 20 × 14 cm, broŝ. ilustr.

Jen legolibro kiu en literatura formo rakontas pri la aferoj de Esperanto grupo en Jugoslavio. La libreto tre detale rakontas pri la evoluo de la grupo, pri ĝiaj klopodoj kaj pri rezultatoj.

Krom la priparolo de la Esp-grupo la libro enhavas plurajn poemojn kaj novelojn de div. aŭtoroj, multajn fotojn kaj ankaŭ diron de Tito favoran al Esperanto.

Rekomendinda aperaĵo, aĉetu ĝin kaj legu ĝin, — kaj agu tiel, kiel niaj jugoslavaj samideanoj, en via grupo.

*R.*


# FOTO
## *Aftryk*

til meget fordelagtige priser. Således kun 26 øre for et 6 × 9. Ved 8 stk. og derover af samme negativ kun 22 øre pr. stk.

**Forlang prisliste!**

Mange års erfaring med forsendelsesforretning. Garanti for omhyggelig udført arbejde.

**Nia Foto,**
*Bjerringbro st.*
v/Henning Nielsen,

Telf. 357.
Giro 66122.

# DANSK VEGETARISK FORENING

varetager vegetarernes fællesinteresser. Der kræves intet løfte af medlemmerne. Kontingent 7 kr. årligt. Ægtepar 8 kr., *inkl.* abonnement på VEGETARISK TIDSSKRIFT. Forlang gratis prøvenummer. Adresse: Ågade 114, II, København N. Telefon: Gothåb 1163 u.

**Ni rekomendas al Esperantistoj**

restadon en nia unuaklasa hotelo. — Esperanto parolata.

*HOTEL DANIA*, Silkeborg. Tlf. 6 - 7 - 686.

☆ Esperanto-BOGTRYK

**Indhent tilbud gratis og uden forbindende hos Sønderjyllands ældste og største bogtrykkeri —**

MODERSMAALETS Trykkeri

Haderslev — Telefon 22031



A-S Modersmaalets Trykkeri - Haderslev